


Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

Zahara (Kadizo)



Aprilo / Junio 2021

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**
P. 06 Heraklo en Andaluzio.
P. 12 La acreditación del conocimiento de idiomas en el informe del Defensor del Pueblo Andaluz. Una oportunidad para el esperanto.
P. 17 Lingva Angulo
P. 20 Nuntempa vortaro
P. 21 Poezia Angulo
P. 22 Folioj por Praktikado
P. 28 La unua manuskripto.
**P. 32 Turismi en ...
*Zahara (Kadizo)***
**P. 36 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio:
*Antonio Burguillos Vilches. la juna fervojisto.***
**P. 39 $E=mc^2$ Sciencia Angulo:
*Komunicado inter formikoj***
**P. 41 Flamenko
*La "rondeñas"***
**P. 43 Fervojista angulo
*La fervojo de l'oliv-oleo***
**P. 45 Andaluzia kuirarto
*"Sopa tostá" kun tomato.***
P. 46 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *La malsanulejo de la mortintoj.*
**P. 48 Vorto-ludoj
*Krucvorto kaj Rebuso***
P. 50 Humuro

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:

José María Rodríguez Hernández

Alejandro Burgos Escalante

COLABORADORES:

Vicente Herrera Cobo

Juan García del Río

Spiros Sarafian

Juan de Dios Montoto Sarriá

Lukas Toczki

Sur la kovrilo:

Kastelo de Zahara, piede sam-noma vilaĝo en la kadiza provinco.

ESPERANTO EN ANDALUZIO

TRADUK-ENTREPRENO INTERESIĜAS PRI ESPERANTO

Antaŭ kelkaj monatoj oni ricevis ĉe Andaluzia Esperanto-Unuiĝo peton de traduk-entrepreno en Granada. Laŭ tiu komunikado oni deziris disponi, inter la profesiuloj de la kompanio, pri esperantisto kapabla agadi kiel tradukisto. Post respondi al tiu peto nia asocio sciis, ke temis pri postulo de la Administracio al tiu entrepreno, kiu devigis al ĝi disponi pri oficialaj tradukistoj en 70 lingvoj, inter ili nepre ankaŭ en esperanto.

Nia asocio tuj respondis kaj proponis la servojn de du membroj de la asocio, kiuj havas oficialan titolon pri esperantlingva kapableco. Kvankam malofte oni petas la servojn de tradukisto en esperanto, sendube jen bona ŝanco por montri la taŭgecon de nia internacia lingvo kiel komunikilo.

PROJEKTO *LORKA*

Hispana Esperanto-Federacio omaĝos la poeton Federico García Lorca dum la kuranta jaro, kiam okazas la 85-a datreveno de la murdo de la poeto kaj la 50-a de la publikigo de la esperantlingva versio de la libro *Cigana Romancaro*.

La projekto, sub la nomo *Lorka*, konsistas en la publikigo en interreto de tiu libro kaj la eldono de nova antologio de poemoj de la granada poeto, fare de la granada tradukisto Miguel Fernández.

Espereble prezentos ambaŭ librojn Duncan Charters, fakulo pri hispana kulturo kaj Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, okaze de la virtuala Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta dum la tagoj 2-a kaj 3-a oktobro 2021.



Federico García Lorca
1898 ~ 1936

PLATERO KAJ MI MONTRITA EN EKSPOZICIO

De la 8-a de aprilo ĝis la 7-a de majo 2021 okazis en la urbo Onubo aktoj pri la temo "*Huelva es Rocío*" (Onubo estas Rosio). Okazis tiam ekspozicioj, prelegoj, rond-tabloj kaj aliaj agadoj por pristudi la ador-fervoron ekzistanta en la onuba provinco al la Virgulino Rosio.

Unu el la ekspozicioj temis pri "Rosio en la verko "Platero kaj Mi". Okaze de tiu agado oni montris tradukaĵojn de la libro en kelkaj lingvoj, inter ili ekzempleron de la libro "Platero kaj Mi" eldonita de nia asocio en la jaro 2010.



PROpono FAVORE AL ESPERANTO FARE DE ANDALUZO

La Eŭropa Komisiono starigis platformon por civitanaj kundiskutoj. La celo estas favorigi la partoprenon de la civitanoj por diskuti pri la estonteco de Eŭropo. Kiel elemento de tiu konferenco la eŭropuniaj civitanoj estas invitataj proponi kaj diskuti ideojn pri kiamaniere EU devas evolui.



Conferencia
sobre el Futuro
de Europa

Kelkaj proponoj jam lanĉitaj rilatas al la lingva reĝimo de la Eŭropa Unio, tio estas, pri komuna lingvo, lingva justeco, ktp. Kelkaj el ili ankaŭ pledas por la uzo de esperanto. Sendube la plej grava kaj diskutata propono estas tiu lanĉita de onubano Enrique Hinojosa de Guzmán Alonso kun la angla lingva titolo "*Esperanto, a common and neutral language, designed to be easy to learn. A new tool for a more united European Union*" (Esperanto, komuna kaj neŭtrala lingvo, kreita por esti facile lernebla. Nova rimedo por pli unuigita

Ĝi estas nun la plej voĉdonata en la sekcio "Aliaj ideoj". Trovu ĝin en la ligilo:
<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399>



Ponto super la torentejo "El Cañuelo"
Roquetas de Mar (Almerio)



Esperanto
ponto inter popoloj

HERAKLO EN ANDALUŬIO

Spiros Sarafian. Grekio

"Heroo!", jen unu ankoraŭ helendevena, jam internacia, konata al ĉiuj, vorto.

Nuntempaj herooj estas plejparte personoj bravaj, kuraĝaj, kiuj, montrante sindonemon, entreprenas eksterordinare grandajn farojn, plejofte sukcesrezultajn. Tamen, la vorto heroo estas treege malnova, ĝi venas el la tre malproksima, perdita en la senkomenca paseo, epoko de la mitoj.

Kompreneble, mi parolas pri la helenaj mitoj, multaj el kiuj, dum la pasado de la tempoj, iĝis, same kiel la vortoj, internaciaj.

La mitaj herooj estis ja homoj, tamen posedantaj superhomajn ecojn. Ili estis brilaj, virtaj, kuraĝaj, fortaj, nevenkeblaj, preskaŭ ĉiopovaj viroj, kies tasko estis ordinare la puno de la malbonuloj, de la krimuloj kaj la protektado de la homoj.

La plej granda heroo en la helena mitologio estas la duondio Heraklo (Ηρακλής) kaj mi parolas ĉi-tie pri li, ĉar tiu granda heroo antingis kaj markis per unu sia heroa faro, la belegan, sudeŭropan juvelon, Andaluzion!

Por paroli sufiĉe kontentige pri la historio de Heraklo, oni devus plenigi centojn da paĝoj, mi, tamen, klopodos priskribi la unuajn paŝojn de la granda heroo, kiel eble plej koncize. Do, mi diru, ke Heraklo estis filo de la kreinto kaj mastro de la tuta mondo kaj de ĉiuj dioj kaj vivantaj estaĵoj, do,

6 filo de la grandioza Zeŭso (Ζεύς).



Monumento al Heraklo en Ceŭto de Ginés Serrán Pagán (2007)

Li estis filo de Zeŭso, tamen naskita ne de la edzino de la granda dio, ne de la majesta diino Hera (Hpa), sed de ordinara, mortema virino, nomata Alkmena (Aλκμήνη). Tio okazis, ĉar la reĝo de la dioj estis eksterordinare virinama kaj amorema viro, do, malgraŭ tio, ke li amis kaj honoris sian belegan edzinon, tre ofte li kuniĝis kun aliaj virinoj, diinoj, duondiinoj, diversaj nimfoj, mortemulinoj, kaj tio kaŭzis ĉiufoje la indignon de lia edzino, kiu tamen, povis fari nenion, krom koleri, ĵaluzi, plendi kaj fine venĝi al la, plejparte senkulpa kaj senpovaj, amorantinoj de la dio kaj ties idoj.



Tiel, Hera forte malamamis Heraklon, precipe pro tio, ke Zeŭso intence kuniĝis kun Alkmena, ĉar li sciis, ke nur el tiu virino li povus akiri sian plej brilan, plej signifan kaj plej utilan por la homaro, filo. Hera, do, sencese klopodadis malutili Heraklon, ŝi faris multon kontraŭ li kaj iam ŝi sukcesis kaŭzi al li tre grandan malbonon. Ŝi iamaniere sukcesis kaŭzi al li ian nelongdaŭran manion, ian subitan amokon, dum kiu, la heroo, ne kontrolante sin, murdis siajn proprajn gefilojn.

Mi ne povas paroli ĉi-tie detale pri tiu malfeliĉega okazintaĵo, mi diru nur, ke kiam Heraklo rekonsciiĝis, li estis ŝargita per pezega krimo, por kies purigo li devis suferi tre grandan punon.

Nu, laŭ la decido de la plej granda sanktejo - divenejo de la tiama tuta mondo, tiu de Delfoj (Δελφοί), Heraklo submetis sin, kiel servanton, al Eŭristeo (Ευρυσθεύς), la reĝo de Miceno (Μηκόναι) kaj Argo (Άργος), kies ordonojn li devis blinde obei dum dek du jaroj.

Kaj tiu Eŭristeo estis homo tre severa kaj malbona, kiu, instigite de Hera, forte malamamis Heraklon kaj deziris ties pereon. Pro tio, dum tiuj dek du jaroj li komisiis al la heroo diversajn taskojn, alfronti la plej grandajn danĝerojn, lukti kaj batali kontraŭ teruraj, monstraj kontraŭuloj

kaj diversspecaj supernaturaj estaĵoj. El tio, do, venis la mondkonataj dek du "laboroj de Heraklo".

Mi diru, tamen, ke la vorto "laboro" ne estas sufiĉa por doni la ĝustan signifon de la helena vorto "ἄθλος" (atlos), kiu montras bravaĵon, grandan, danĝeran, lacigan, tre malfacilan atingon, sukcesrezultan, malfacilegan faron, ĉion tion ĉi kune. Mi aŭdacas ĉi-tie uzi nenorme la vorton "grandfaro".

Unu do el tiuj grandfaroj de Heraklo estis la ŝtelo de la bovgrego de Geriono (Γηριόνης). Kaj tiu Geriono estis terura giganta homforma monstro. Monstro, ĉar li havis tri korpojn kunligitajn je la talio, do, li havis tri kapojn, ses manojn kaj ses piedojn, li estis estaĵo enorma, treege forta.

Tiu, do, monstro posedis gregon da unikaj en la tuta mondo ruĝharaj bovoj kaj la ordono de Eŭristeo al Heraklo estis, ke li ŝtelu la gregon kaj konduku ĝin al Helenujo, al Argo.

Tamen, tiu monstro kaj ties grego loĝis treege malproksime, en la fora Hesperio (Εσπερία). Kaj Hesperio estis por la Helenoj la tuta mondo etendiĝanta okcidenten, trans la helenaj landoj.

El tiu vorto "Εσπερία", montranta la okcidenton, do la direkton kaj lokojn, kie la suno subiras, elvenis la vorto "εσπέρα" (espera), kaj el tiu, la E-vorto "vespero", ambaŭ montrantaj la parton de la tago, kiam la suno iras al Hesperio, subiras.

Do, Heraklo, devigite iri al lokoj tre foraj kaj nekonataj, atingis la mondekstremon, la forfinon de la mondo, la lokon, kie Mediteraneo perdiĝas en la obskuran akvan mondon de la grandioza dio Oceano (Ωκεανός), kiu ĉirkaŭis la teron.

Tiele, Heraklo atingis Andaluzion, ĉar Geriono vivis en insulo de tiu fora mondoparto, insulo nomata Eritejo (Ερύθεια, en la latina Erythaea), supozeble en la loko de la hodiaŭa bela Kadizo (Κάδιξ), la antikva Gadejro (Γάδειρα).

Heraklo faris longan vojaĝon, dum kiu li alfrontis grandajn danĝerojn, 8 li spertis abundon da aventuroj, ĝis kiam li atingis la lokon de Afriko, kie ne tre



Andaluzia blazono.
Aperantaj en ĝi
Heraklo kaj la kolonoj.



Kadizo, urbo kun tri mil jaroj da historio

longa markolo estas inter la nigra kontinento kaj Eŭropo.

Li atingis Hesperion kaj Eritejon transpante, post granda penado, kaj tra multaj danĝeroj, tiun markolon kaj je memoro de tiu sia aventuro li starigis du grandegajn kolonojn, la unun sur la afrika kaj la alian sur la eŭropa tero, limigante tiele la mondekstremon, la lastan terlimon. Kaj tiuj kolonoj iĝis kaj estas konataj kiel "Kolonoj de Heraklo" (Ἡράκλειος Στήλες), la hodiaŭa Ĝibraltaro (Γιβραλτάρ).

Ne estas multo tio kion oni povas diri pri tiu grandfaro mem de Heraklo, ĉar ĉio estis facila por la granda heroo. La gregon paŝtis kaj gardis terura, fortega giganto, nomata Eŭritiono (Ευρυτίων), senbride perfortema estaĵo, filo de la granda dio de la milito Areso (Αρης). Kaj tiu Eŭritiono posedis monstran, grandegan hundon kun forto de cent bestioj. Tiu hundo-monstro, nomata Orto (Ορθος), havis du kapojn kaj serpentan voston, kelkaj diris, ke ĝi havis kromajn sep serpentajn kapojn.

Kiam Heraklo alproksimiĝis, Eŭritiono, la terura paŝtisto, kiu posedis eksterordinare akrajn orelojn, tuj ekaŭdis lin, li eksaltis kaj eligante terurajn kriegojn, furioze sin ĵetis kontraŭ la invadinton. Heraklo levis sian enorman klapon kaj per nur unu bato li mortigis la atakinton. Tio estis por li sufiĉe facila, tamen tuj pli poste la monstra hundo, kun terurovekaj bojoj kaj roroj sin ĵetis kiel senbrida vento kontraŭ la heroon kaj per siaj fulmaj movoj, atakoj, returniroj, sencesaj turniĝoj, pruvis, ke ĝi estas vere tre kapabla gregogardisto. Tamen, tio ne sufiĉis, ĉar la batoj de la herakla klabo frakasis la kapojn de la monstra gardisto kaj donis finon al ties fidela servado.

Restis unu nur kontraŭulo, Geriono mem, la triobla giganto, kiun Heraklo ne povus alfronti per klabo, do, de proksime, ĉar kontraŭ li estis ses armitaj manoj. Do, kiam la monstro leviĝis antaŭ li, la heroo lasis la klapon, li levis sian grandegan pafarkon kaj rapidege, per siaj pezaj sagoj li trapenetris ĉiujn tri

enormajn korpojn de la monstro.

Tiele, Heraklo forprenis la valorajn bovojn kaj kondukis ilin al Helenujo, tamen post multaj kromaj bataloj, post diversaj aventuroj, kies rakontado postulas multajn paĝojn.

Mi diru nur tion, ke per tiu sia deka grandfaro, la plej granda helena heroo, Heraklo, iĝis iom hispana, lasinte siajn spurojn sur la belega Andaluzio!



Gravuraĵo reprezentanta Heraklon kaj la kolonojn.
Aŭtoro: Heinrich Aldegrever (1502 ~ 1558)

ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2021 aŭ 2022.



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

.Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del socio.
- Concepto: Cuota 2021 o 2022

La acreditación del conocimiento de idiomas en el informe del Defensor del Pueblo Andaluz.

Una oportunidad para el esperanto.

El Estatuto de Autonomía de Andalucía dispone en su artículo 128 que el Defensor del Pueblo Andaluz (DPA) es el comisionado del Parlamento que, entre otras funciones, tiene la tarea de supervisar la actividad de las Administraciones Públicas de Andalucía, dando cuenta al Parlamento de su actividad. El medio para llevar a cabo esta comunicación es la elaboración de un informe anual, donde da cuenta de las gestiones realizadas, esto es del número de quejas recibidas, cuántas pudieron solucionarse, órganos administrativos sobre los que se plantearon reclamaciones, etc.

La Ley que regula la institución del DPA dispone que esta figura no es competente para modificar o anular actos o resoluciones administrativas, lo que legalmente solo pertenece a la propia Administración o en último término a jueces y tribunales. Esto es, el DPA tan solo puede sugerir la modificación de los criterios utilizados por la Administración para abordar un tema, por lo que el contenido del informe que anualmente presenta el Defensor ante el Parlamento tan solo puede contener sugerencias para que la Administración actúe en uno u otro sentido, recomendaciones que podrán ser seguidas o no por el Parlamento.



*S-ro Jesús Maeztu Gregorio
de Tejada. Ombudsmano de la
Andaluzia Popolo - DPA*

En el año 2019, como un apartado más del informe que el DPA presentó al Parlamento de Andalucía, se analizaba la cuestión del requisito exigido por las universidades andaluzas a sus alumnos de acreditar estar en posesión de una titulación de nivel B1 en un idioma extranjero, para obtener el grado universitario.

En primer lugar, hay que poner de manifiesto que esta exigencia se contiene en el Plan Bolonia aprobado en el año 1999 por los Estados de la Unión Europea, más otros del continente, y que tiene como objetivo iniciar un proceso de convergencia que facilite el intercambio de titulados y adapte el contenido

de los estudios universitarios a las necesidades del mercado. Una de las disposiciones de este plan prevé que debería ser necesario para la obtención de cualquier grado universitario, disponer de un certificado acreditativo de las competencias lingüísticas adquiridas en un segundo idioma, es decir que para finalizar con éxito los estudios en cualquier universidad europea sea necesario contar con un diploma, al menos de nivel B1, de un idioma extranjero.



Manifestantes contra el Plan Bolonia - Manifestantoj kontraŭ la Bolonja Procezo

Ahora bien, esta exigencia debe calificarse como una recomendación o de un objetivo incluido en el Plan Bolonia, pero de ninguna de las maneras se trata de una obligación impuesta legalmente en España. Será cada universidad la que, en el ejercicio de su autonomía, defina esa necesidad o no. Así, nos encontramos con casos como el de la Universidad de Santiago de Compostela, en la que por una sentencia del Tribunal Superior de Justicia de Galicia se anuló esa exigencia o el de algunas universidades catalanas, donde tampoco se exige.

En lo que se refiere a Andalucía todas las universidades de la Comunidad decidieron exigir para la obtención de un grado universitario, una titulación B1 en alguno de los idiomas cuya relación¹ aprobó el Consejo de Universidades. Aunque hay que indicar que la igualdad no existe en este sentido para todos los

1. Las lenguas relacionadas son alemán, árabe, checo, chino, coreano, finlandés, francés, griego, hebreo, inglés, italiano, japonés, neerlandés, polaco, portugués, rumano, ruso, turco y sueco.

estudiantes andaluces, en tanto que aquellos que estudian en la UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia) no están obligados a acreditar la competencia lingüística en ningún idioma.

Esta diferencia a la hora de fijar unos requisitos para alcanzar un mismo grado universitario ha motivado numerosas quejas al DPA, lo que hizo que en el año 2019 este fuera uno de los temas analizados en el informe anual presentado ante el Parlamento. Veamos cuál fue la postura del Defensor, volviendo a recordar de nuevo que su función tan solo es la de sugerir un modo de actuar a la Administración, en este caso a la educativa.

El DPA abordó en su informe la necesidad de crear una normativa más adecuada para la acreditación B1 de una lengua extranjera en la Universidad. En primer lugar se mostró partidario de la exigencia del conocimiento de un idioma extranjero para la obtención de un grado universitario, si bien admitía que algún pronunciamiento judicial² había declarado nulo dicho requisito. Por el contrario otros tribunales³ sí habían declarado válido esta obligatoriedad, en tanto que había sido aprobada por el Consejo de Universidades y autorizada por la Comunidad Autónoma. Se echa en falta para este caso un pronunciamiento del Tribunal Supremo en casación⁴ para la unificación de doctrina, aunque también es cierto que en ningún momento se le ha planteado esta cuestión.

Admitida en un primer momento por parte del Defensor del Pueblo Andaluz la necesidad de acreditar la competencia lingüística en una segunda lengua extranjera, el propio Comisionado plantea una serie de problemas para los que resulta necesario encontrar una solución adecuada y que son los siguientes:

- Si se exige la obtención de un título nivel B1 de un idioma extranjero,

² En concreto el Tribunal Superior de Justicia de Galicia en su Sentencia de 21 de marzo de 2018 declaró nulo el requisito de exigir la acreditación de conocimiento de un idioma extranjero, en tanto que no se contemplaba en el Plan de Estudios del grado correspondiente, Así, si un alumno comenzaba sus estudios en la Universidad siguiendo un Plan en el que se le exigía superar un determinado número de asignaturas o de créditos, de ninguna manera la propia Universidad podía hacerle recaer posteriormente la obligación de obtener un determinado nivel de competencia lingüística, siempre que dicho requisito no se hubiera incluido en el Plan de Estudios.

³ El Tribunal Superior de Justicia de Andalucía en Sentencia de 16 de junio de 2016.

⁴ Por medio del recurso de casación para la unificación de doctrina el Tribunal Supremo puede revisar lo ya juzgado en primera instancia o en recurso ante el Tribunal Superior de Justicia de una Comunidad Autónoma, siempre que hayan existido en distintas Sentencias criterios contradictorios en la aplicación de una norma.

habrá que tener en cuenta que, generalmente, para la obtención de dicha titulación se siguen estudios privados, para los que no existe una regulación oficial en cuanto al coste de su matrícula. Resulta paradójico que para la obtención de un grado en una universidad pública se exija una titulación previa que en la mayoría de los casos se consigue en un centro privado, con lo que eso conlleva de coste económico para el alumno.

- Se denuncia también por el DPA que se haya establecido una relación de idiomas que sí son valorados, en detrimento del resto que no lo son. Existe una evidente discriminación lingüística que carece de todo sentido. ¿Por qué unos idiomas como el inglés, el checo o el finlandés sí son aceptados, mientras que otros como pudieran ser el persa, el danés o el noruego no lo son?

Por otra parte, el propio DPA destaca el hecho de que existen otras lenguas, a las que el Comisionado denomina "no tradicionales", como son el esperanto o la lengua de signos, que tampoco resultan reconocidas para acreditar la competencia lingüística. Y todo esto unido al hecho de que tan solo se reconocen una serie de títulos y de centros expedidores de los mismos.



La Ombudsmano havigas sian jaran raporton al la Prezidantino de la Anddaluizia Parlamento - El DPA hace entrega de su informe anual a la Presidenta del Parlamento

Como el propio informe afirma: *las cuestiones y controversias que se suscitan en relación a la exigencia de acreditación de un determinado nivel de conocimiento de una lengua extranjera para la obtención de una titulación unviersitaria son lo suficiente relevantes como para demandar la aprobación de algun tipo de norma que, no solo dote de seguridad juridica a esta exigencia, sino que, ademas, sistematice y clarifique las diferentes cuestiones actualmente planteadas en el orden procedimental, económico o regulatorio.*

Hay que agradecer por lo tanto, el llamamiento que hace el DPA en su Informe del año 2019 para que se garantice, por medio de alguna norma, la igualdad en cuanto a la lengua que el alumno elija y también en relación al libre acceso de todos los alumnos para adquirir una competencia lingüística, por el evidente coste económico del aprendizaje de un idioma.

Pero el debate acerca de este requisito no se agota en cuestiones procedimentales, reglamentarias o económicas, sino que alcanza también a la determinación de cuáles deben ser las lenguas extranjeras cuya acreditación se considera aceptable para entender cumplido el requisito, considerando algunos discriminatorio que algunas lenguas extranjeras estén aceptadas mientras otras, especialmente las minoritarias, son rechazadas

Un debate al que se suman aquellos que demandan que, además de las lenguas extranjeras tradicionales, sean reconocidas también otras como el esperanto o la lengua de signos

Extracto del Informe del Defensor del Pueblo Andaluz del año 2019.

Apartado "La acreditación B1 de Lengua Extranjera para el Acceso a la Universidad"

Por otra parte es importante el toque de atención que hace el DPA sobre la no conveniencia de acotar unas lenguas concretas, olvidando el reconocimiento universitario que sin duda merecen los idiomas minoritarios o a los que como el DPA llama "no tradicionales" y concretamente al esperanto.

Y para el caso de que fuera atendido, a corto o medio plazo, el llamamiento que hace el DPA para que se armonice administrativamente esta exigencia, no debemos dejar de intentar influir para que el esperanto sea reconocido como idioma apto en relación a la exigencia universitaria de contar con una titulación B1. El DPA con su informe nos ha abierto las puertas y aunque se trate tan solo de una recomendación no debemos de dejar de aprovecharla.

José María Rodríguez



En español los verbos *comenzar* y *finalizar* pueden ser transitivos e intransitivos, es decir, pueden llevar un objeto directo -aquello que alguien empieza o finaliza- en este caso serían transitivos, o no llevarlo, cuando nos referimos a que algo en sí mismo empieza o finaliza, en este caso hablaríamos de un verbo intransitivo.

Veamos algunos ejemplos:

- La masonisto komencis la konstruon de la nova domo.
El albañil comenzó la construcción de la nueva casa.
- La studanto finis siajn studojn en la universitato.
El estudiante finalizó sus estudios en la universidad.

En los dos ejemplos anteriores encontramos lo siguiente:

- **un sujeto:** alguien que comienza o finaliza algo.
La masonisto. La studanto
- **un objeto:** lo que ese alguien comienza o finaliza.
La konstruon de nova domo. Studojn en la universitato

Ahora veamos otros ejemplos:

- La jaro komenciĝas en la monato januaro.
El año comienza en el mes de enero.

- La libro finiĝas en la paĝo 100-a,
El libro finaliza en la página 100.

En este caso nos encontramos con un sujeto: el año; el libro. Pero no encontramos un objeto, ya que el año no comienza nada, o mejor dicho, se comienza a sí mismo. Tampoco el libro finaliza nada, se termina, se finaliza él mismo.

El sujeto en frases con Komenci / Fini suele ser una persona: aquella que comienza o finaliza algo.

Utilizaremos el acusativo (-n) para indicar lo que se comienza o se finaliza.

Naturalmente podemos comenzar no una cosa, sino una acción, en ese caso utilizaremos el infinitivo del verbo.

- Mia patro komencis dormi tuj post la vesper-manĝo.
Mi padre comenzó a dormir inmediatamente después del almuerzo.

En este caso podríamos haber utilizado el prefijo EK-, que ya sabes que significa: "comenzar a hacer algo".

- Mia patro ekdormis tuj post la vesper-manĝo.

Si hablamos de que algo, generalmente un suceso o una situación, comienza o finaliza, estaremos diciendo no que se inicia algo exterior a él, sino que se comienza o se finaliza a sí mismo. Veamos algunos ejemplos:

- La koncerto komenciĝos post la saluto de la urbestro.
El concierto comenzará después del saludo del alcalde.
- La jaro komenciĝis per granda festo.
El año empezó con (por medio de) una gran fiesta.

- La koncerto finiĝis post la Kvina Simfonio.
El concierto finalizó después de la 5ª Sinfonía.
- Venont-semajne la jaro finiĝos.
La semana que viene finalizará el año.

Quando es un suceso o una situación la que comienza o finaliza utilizaremos

Komenciĝi / Finiĝi

La koncerto komenciĝos baldaŭ

Veamos algunos ejemplos más:

- Mia fratino komencis am-rilaton kun mia plej bona amiko.
Mi hermana ha comenzado una relación amorosa con mi mejor amigo
- Am-rilato komenciĝis inter mia fratino kaj mia plej bona amiko.
Una relación amorosa ha comenzado entre mi hermana y mi mejor amigo.
- Via hundo komencis boji kiam ĝi vidis min.
Tu perro comenzó a ladrar cuando me vió.
- Komenciĝis pluvi kiam griza nubo okupis la tutan ĉielon.
Ekpluvis kiam griza nubo okupis la tutan ĉielon.
Comenzó a llover cuando una nube gris ocupó todo el cielo.
- Finiĝis la forta bruoj kiam la aŭtomobiloj foriris.
Finalizó el ruido fuerte cuando los automóviles se marcharon.

Así que no lo olvides:

- **Si alguien comienza o termina algo:**
SUJETO + KOMENCI / FINI + OBJETO (en acusativo -n).
- **Si algo comienza o termina de suceder:**
SUJETO + KOMENCIĜI / FINIĜI (no hay objeto)



NUNTEMPA VORTARO


Sportoj en la Somera Olimpiko Tokio 2020

 Sinkrona Naĝado	 Plonĝado	 Maratona Naĝado	 Naĝado	 Akvopilko	 Arkopafado	 Atletiko
 Korbopilko	 Triopa Korbopilko	 Boksado	 Slalomo	 Kajakado	 BMX	 BMX vetkura
 Dresrajado	 Rajdokonkurso	 Ĉevalsaltado	 Skermo	 Futbalo	 Golfo	 Arta Gimnastiko
 Hokeo	 Ĵudo	 Katao	 Kumiteo	 Moderna Pentatlo	 Remado	 Rugbeo
 Sporta Grimpado	 Ondorajado	 Tabloteniso	 Tekvondo	 Teniso	 Triaatlono	 Plaaĝo Flugpilko
 Badmintono	 Bazopilko	 Softbalo	 Montobiciklado	 Voja Biciklado	 Traka Biciklado	 Ritma Gimnastiko
 Velado	 Pafado	 Rultabulado	 Flugpilko	 Halterlevado	 Luktado	 Trampolina Gimnastiko



POEZIA

ANGULO



LA KOLOMBO

Eraris, ve! La kolombo!
Faris erarojn!

Prenis la sunon por nordo.
Kredis la tritikon akvo.
Faris erarojn!

Kredis la nokton mateno;
La ĉielon kredis maro.
Faris erarojn!

Kredis la stelojn ros-gutoj;
la neĝo-falon, la varmo.
Faris erarojn!

Vian jupon, sia bluzo;
vian koron, sia ĉambro.
Faris erarojn!

(Ĝi dormadas nun marborde;
vi, sur la supro de branĉo.)

Rafael Alberti
El Puerto de Santa María (Kadizo)
1902 ~ 1999



En esperanton tradukis
Miguel Fernández

Bona Espero

Folioj por
Praktikado

Bona Espero

Bona **Espero** estas la nomo de **farmo-lernejo** kiu troviĝas proksime al la ĉefurbo de Brazilo, **meze de** la Amazona ĝangalo. Tiu lernejo gastigas infanojn kiuj, pro diversaj kaŭzoj, havas malfacilajn vivojn: **orfojn**, senrimedajn kaj **mistraktitajn** infanojn, ktp. Tiu institucio estis fondita dum la **50-aj jaroj**, fare de kelkaj brazilaj esperantistoj. **Ekde tiam**, kelkaj **centoj da infanoj** estis edukataj, nutrataj kaj flegataj. **Direndas** ke multaj **volontuloj venintaj el** diversaj partoj de **Esperantujo** daŭre kunlaboris senpage por la fortigado kaj plifirmigado de tiu unika loko: kuracistoj, ĝardenistoj, kuiristoj, muzikistoj kaj ĉiuspeciaj laboristoj alvenis, ĉeestis kaj kunlaboris en la projekto. **Aldonendas**, ke la bieno **memsufiĉiĝas** pri kuranta akvo kaj elektro; kaj ke la nutraĵaro estas preskaŭ vegetarisma por ĉiuj enloĝantoj.

Sufiĉe granda nombro da kantoj, poemoj, libroj kaj artikoloj estas dediĉitaj al Bona Espero. Mi elektis, kiel specimemon, tiun kanton de Alejandro Cossavella, surbendigitan kun la argentina ensemblo Strika Tango. Sube mi almetas la ligilon al la filmeto de Jutubo, kie la kanto **spekteblas**. Do, aŭskultu, legu kaj ĝuu!

<https://www.youtube.com/watch?v=DtpQPIZsXFk>

> Espero

En español el verbo "esperar" tiene dos acepciones, una la de esperar algo sobre lo que se tiene esperanza y otra esperar algo o alguien que debe venir u ocurrir en un momento determinado. En esperanto cada una de esas acepciones se indica con un verbo diferente. Así, si decimos que tengo una esperanza

diremos "esperi", mientras que si estamos esperando a alguien que va a venir, usaremos "atendi".

- Mi esperas, ke Vi sukcesos la ekzamenon.

Espero (tengo la esperanza) de que tu tengas éxito en el examen.

- Mi atendas mian amikon, li tutcerte ne akuratiĝos.

Espero (estoy esperando) a mi amigo, él con toda seguridad no será puntual.

> **farmo-lernejo**

Se traduce por "granja escuela". En esperanto podemos caracterizar un sustantivo de varias maneras. La más usual es añadiéndole, antes o después del sustantivo, un adjetivo, así podríamos decir "farma lernejo". Pero a veces necesitamos darle un sentido más exacto, porque en el ejemplo que proponemos no estamos hablando de una escuela que tenga forma de granja, sino de una instalación que es a la vez y al mismo tiempo "granja" y "escuela", así que realmente debemos usar dos sustantivos. ¿Pero cómo? Hay dos maneras, la primera es unir ambos sustantivos y el primero de ellos perdería la vocal "o" final, así diríamos: "farmlernejo".

Pero si nos damos cuenta hay que pronunciar tres consonantes seguidas R+M+L. A un hispanoparlante, y no solo a nosotros, esa pronunciación le resulta dificultosa, así que podemos decir los dos sustantivos juntos y a la hora de escribirlos unirlos con un guión. Por cierto, no olvides, que el sustantivo que se coloca al final, en este caso "lernejo" es el que más debe ajustarse al objeto del que estamos hablando. Así, si decimos "farmo-lernejo" o "farm-lernejo", estamos destacando que de lo que de verdad se trata es de una "lernejo", o sea de una escuela.

> **meze de**

En medio de... Un ejemplo: la koro troviĝas meze de la brusto (*el corazón se encuentra en medio del pecho*).

> **orfojn...**

Te preguntará por qué "orfojn senrimedajn kaj mistraktitajn infanojn" va en acusativo. Bien, te habrás dado cuenta de que se refiere a "infanojn" en la frase: "tiu lernejo gastigas infanojn..." (ese colegio alberga niños...). En la frase siguiente se describen a esos niños: "orfojn, senrimedajn kaj mistraktitajn infanojn" (*huérfanos y niños sin recursos y maltratados*). Como estamos

diciendo realmente que "la lernejo gastigas orfojn, senrimedajn kaj mistraktitajn infanojn", entonces usaremos el acusativo, porque se trata de un objeto directo del verbo "gastigi" (albergar).

> **mistraktita**

El prefijo "mis" indica algo malo, injusto, erróneo. No debemos confundirlo con el prefijo "fi" que significaría que algo es moralmente malo, ni tampoco con el prefijo "mal" que indica una idea contraria, pero no tiene que tener una idea de que es algo malo.

Por el contrario "mis" sí indica algo injusto o equivocado. Veamos algunos ejemplos:

- Trakti: tratar Mistrakti: maltratar (tratar injustamente).
- Skribi: escribir Misskribi: escribir con errores.
- Kalkuli: calcular Miskalkuli: hacer un cálculo erróneo.

Si lo utilizamos como adverbio "mise" podríamos traducirlo como "erróneamente" y si se trata de un adjetivo "misa", podría ser "equivocado".

Por cierto, para todos los que piensen que el esperanto es algo monolítico y que se trata de una lengua sin vida, hay que recordar que el prefijo "mis" no aparece en el Fundamento de Esperanto, la obra del Dr. Zamenhof donde se daba a conocer la gramática del idioma internacional. Se trata de un prefijo que comenzó a usarse en la literatura en esperanto y que fue oficializado por la Academia de Esperanto en el año 1929, es decir 40 años después de que surgiera el idioma.

> **50-aj jaroj**

Se lee "kvindekaj jaroj" y se traduce por los "años 50". Recuerda que en esperanto el número ordinal (primero, segundo, tercero...) se forma añadiendo una "a" al número cardinal (uno, dos, tres...). Así que "kvindeka" se traduciría realmente por "quincuagésimo". En este caso ¿No te parece que el esperanto es más fácil que el español?

> **fare de**

Aunque "fare de" es una construcción que puede parecer supérflua, porque viene a significar lo mismo que "de" en las oraciones pasivas, la verdad es que aporta claridad. Veamos algunos ejemplos:

La asocio estis fondita en 1950 de prestiĝaj profesoroj.

La asocio estis fondita en 1950 fare de prestiĝaj profesoroj.

La asociación fue fundada en 1950 por (parte de) unos profesores de prestigio

Así que lo más frecuente es usar solo "de" como inicio del complemento agente en las oraciones pasivas, pero no debemos olvidar "fare de" también se puede usar y significativamente exactamente lo mismo: (de, por parte de).

> **Ekde tiam**

Desde entonces. "Ekde" marca el momento de inicio de algo.

> **centoj da infanoj**

Siempre repetimos en esta sección la cuestión del partitivo "da". Recuerda que si hablamos de una cantidad de algo, la palabra que indique el género de lo que calculamos va precedido por la preposición "da". Ejemplos:

- Por esti bona verkisto estas necese legi centojn da libroj.
Para ser un buen escritor es necesario leer cientos de libros.
- La fiŝkaptisto revenis hejmen kun dekoj da fiŝoj.
El pescador regresó a casa con decenas de peces.

> **Direndas**

Nos encontramos con el verbo "diri" (decir) al que se le ha añadido el sufijo "end" (es necesario...). De este modo "Direndi" se podría traducir por: "es necesario decir". Se diferencia del sufijo "ind" (es digno de...), en tanto que IND solo indica que algo debe de hacerse, mientras que END impone una obligación: algo debe hacerse, es necesario hacerlo.

> **volontuloj venintaj el**

Se traduce por "voluntarios venidos de". Recuerda que la preposición EL significa "de" en el sentido no de pertenencia sino de origen. Tiene, además, un sentido de extracción, es decir "de dentro afuera". Así que "venintaj el" nos da la idea de que alguien "vino desde".

> **Esperantujo**

Se puede traducir por "el país del Esperanto", "la comunidad esperantista". Como verás el idioma esperanto también tiene su propia metalingüística, entendida ésta como las relaciones entre el idioma y la comunidad que lo habla. El sufijo UJ significa "donde hay...", en el comienzo del idioma era el sufijo que se añadía al nombre de un nacional o de una raza para indicar su país. Así, verás en escritos antiguos, y no tan antiguos, en esperanto que se decía "Hispanujo",

Francujo, Germanujo o incluso "Andaluzujo". En la actualidad se trata de un sufijo casi en desuso para indicar el nombre de un país, se ha sustituido casi por completo por el sufijo IO. Pero su uso es correcto, así que "Esperantujo" o también "Esperantio" sería el imaginario país del Esperanto o la comunidad esperantista.

> Aldonendas

Nos encontramos con un caso similar al anteriormente visto de "Direndas". En este caso el sufijo END se ha unido al verbo "Aldoni" (añadir). Se traduce por "Resulta necesario añadir" o simplemente "Hay que añadir".

> memsufiĉiĝas

El verbo "Memsufiĉiĝi" se podría traducir por "ser autosuficiente". Hemos destacado este verbo para estudiar el adverbio "mem". En esta frase tiene el mismo sentido que el prefijo español "auto", es decir, que algo se hace por propia voluntad, sin ayuda de nadie y sin ninguna influencia exterior. Ese mismo es el sentido de "mem". Veamos un ejemplo.

- En la pordo de la trinkejo aŝiŝo diris "Deviga memservado".
En la puerta del bar un cartel decía "Autoservicio obligatorio".

> Spekteblas

De nuevo vemos como un sufijo se añade a un verbo. En este caso el su fijo "EBL" (que se puede), se une al verbo "Spekti" (visualizar). "Spektebli" significaría "Se puede visualizar". Veamos otro ejemplo:

- La akvo de la fontano ne trinkeblas. (Ne estas trinkebla).
El agua de la fuente no se puede beber.



**Cada pueblo con su
lengua y el esperanto
para todos.**

lernu!

Esperanto?

www.lernu.net

Página multilingüe para el aprendizaje
del idioma internacional Esperanto



Cursos

Lecciones interactivas de Esperanto con ejercicios, sonidos e ilustraciones

A^B

Gramática

Estudio de toda la gramática del Esperanto con ejemplos

Biblioteca

Materiales multimedia del mundo real del Esperanto




Foros

Puntos de encuentro en multitud de idiomas y sobre diferentes temas en y sobre el Esperanto



www.lernu.net



La unua manuskripto



Lukas Toczki

Laŭdire, la patro de juna D-ro Zam bruligis la manuskripton kiu enhavis la unuan version de lingvo elpensita de lia filo. Ĉu vi scias tion kio okazis reale?

Tiu informo ne aperis en la televid-ĵurnalo kiel unu el la ĉefaj novaĵoj. Tamen, oni raportis pri tio ene de la kultura rubriko de la plej gravaj revuoj: *"juna okul-kuracisto ĵus sciigis pri siaj streboj krei novan lingvon, elpensita por esti uzata kiel dua lingvo de la tuta homaro"*. La bopatro de la doktoro Zam, ĉi tiu estis la aŭtoro de la projekto, konsilis uzi la plej modernajn rimedojn por disvastigi la projekton, li eĉ mon-helpis cele la eldonon de libro-metodo, la kreadon de alloga interreta paĝo kaj la organizadon de prelegoj tra la plej gravaj ĉefurboj de la tuta mondo por diskonigi la novan lingvon.

Do, la juna doktoro Zam, apogita de la revema bopatro, organizis gazetan konferencon en Nov-Jorko, tuj apud la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj. La bopatro revis pri la fakto, ke la edzo de lia kara filino Klar povus iam prezenti la projekton ĉe la Ĝenerala Asembleo de UN. Ho! Kia granda honoro ankaŭ por li, kiel bopatro de la aŭtoro. Tutcerte la Pac-Nobelpremio estus la posta paŝo.

Dudeko da ĵurnalistoj ĉeestis la konferencon. Verdire ne temis pri granda kvanto da informistoj, sed estas necese averti, ke la plej gravaj revuoj sciigus pri la akto. Dum duonhora la juna d-ro Zam prezentis la lingvon, li sciigis pri la simpleco de la gramatiko kaj samtempe pri la profitoj kiujn povus altiri tiu nova lingvo al la homaro. Poste, ĵurnalistoj ekdemandos la aŭtoron. La bopatro fieris, tamen la juna doktoro vidis sin mem kiel beston ene de kaĝo ĉe best-ĝardeno. Li ekŝvitis.

La bopatro invitis al la ĵurnalistoj paroli. La unua demando venis de franca radio-parolisto:

"Nu, sinjoro Zam, mi atente legis vian gramatikon kaj mi vidas, ke vi preferas uzi la vorton "kaj" kiel konjunkcio, anstataŭ la sendube pli internacian "et". Do, ĉu vi pensas, ke la mondo devus koni la klasikan grekan lingvon?"

D-ro Zam malfermis sian buŝon por respondi, tamen, pli rapide, greka ĵurnalisto, tre ofendita, ekkriis al la franca kunulo:

"Ve, franco! Ĉu vi ne konsideras taŭgan kiel komunikilon la grekan lingvon? Se via lando ĝuas demokratian sistemon estas pro la fakto, ke ni, grekoj, inventis la demokration.

Kion vi diras? - respondis la franco. Vi inventis nenion! Ni likvidis la absolutismon pere de revolucio kaj pro tio ni ne bezonis la klasikajn grekojn.

"Atentu! Atentu! - la bopatro de la doktoro kriis. Bonvolu ne diskuti inter vi mem. La celo de la konferenco estas prezenti lingvon elpensitan de mia kara... de la doktoro Zam. Li ne deziris montri familian korinklinon. Ĉu alian demandon? - li aldonis.



Araba ĵurnalisto levis sian manon kaj li rapide demandis:

- Nu, kara doktoro, vi estas judo, ĉu via elpensajo estas kaŝita instrumento por regi la tutan mondon fare de via gento?

La juna doktoro Zam surpriziĝis, li neniam pensis, ke iu povus imagi tiun celon por lia elpensajo. Li elŝiris sian barbon kaj pruvis respondi tiun demandon. Tamen, israela ĵurnalisto laŭte diris:

- Kion vi asertas? Rasisto! Antisemito! Tutcerte via ĵurnalo estas legata nur de nazioj!



La juna doktoro ankoraŭ ne ekrespondis tiun demandon kaj ambaŭ ĵurnalistoj komencis bati unu la alian. La organizanto de la gazetara konferenco pruvis apartigi ilin, sed, verdire, li ne sukcesis.

- *Nu, ĉu plia demando?*- la bopatro de la aŭtoro pruvis pacigi la etoson.

Tiam, estis la vico de brita ĵurnalista.

- *Kara doktoro Zam-* li flegme diris, - *ĉu via nova lingvo celas demeti la anglan lingvon el la evidente supera pozicio de mia idiomato je internacia nivelo?*

La juna doktoro prenis glason da akvo kaj post longa trinkado li ekrespondis, tamen, ĉina redaktoro de revuo ekkriis:

- *Ĉu supera pozicio? La supera pozicio de la angla lingvo baldaŭ finiĝos. Se paroli pri nombro da parolantoj la ĉina lingvo superas la anglan amplekse!*

La brita ĵurnalista ridetis kaj la ĉina redaktoro admonis:

- *Ni renkontiĝu post kelkaj jaroj kaj ni tiam vidos kiu lingvo estas pli uzata je internacia nivelo, sendube la ĉina lingvo!*

- *Ne forgesu la hindan lingvon!* - admonis bharata redaktoro.

La bopatro de la juna doktoro komprenis tiam, ke la organizado de konferenco ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj estus tre malfacila afero. Tamen, li pruvis repacigi la ĵurnalistaron:

- *Nu, doktoro Zam estas tre okupata homo kaj li havas tempon por respondi nur unu plian demandon-* avertis la bopatro.

Tiam, hispana ĵurnalisto levis sian manon kaj diris:

- *Estimata doktoro, mi trafolumis vian gramatikon kaj mi vidas, ke ĝi estas plena je supersignaj literoj, tamen mi trovis eĉ ne unu literon N̄.*

- *Ankaŭ nenium literon W mi vidis kaj parolinda lingvo ne ekzistas, se mankas tiu litero* -asertis germana redaktoro.

- *Kaj kion diri pri la mankanta litero Ā?* -demandis svedo.

- *Kial nur kvin vokaloj?* -diris rusa ĵurnalisto.

- *Mi preferas la svahilan!* -Kriis centr-afrika redaktoro.

- *Doktoro, ĉu estas eble spekti X-filmojn en via lingvo?*
Mi vidas, ke tiun literon vi ne uzas. -Kriis usona ĵurnalisto.



La etoso fariĝis tute freneza. Ĉiuj ĉeestantoj demandis samtempe, franco kaj greko ankoraŭ diskutis voĉe kaj mane; arabo kaj israelano batis unu la alian; brito kaj ĉino minacis sin laŭte... la bopatro pruvis pacigi ĉiujn, dum li ekforgesis la ideon pri la Nobel-Premio.

Tiam, la juna doktoro Zam, kiu sukcesis respondi eĉ ne unu demandon, trankvile prenis sian poŝtelefonon. Malgraŭ la laŭta bruado, batoj kaj diskutoj li ekkonversaciis per-telefone:

- *Saluton, paĉjo, jen Zam... Atentu!... Ĉu la hospitalo ankoraŭ serĉas okul-kuraciston? ... Ĉu vere?... Nu, mi akceptas... Alia plia afero... Ĉu vi ankoraŭ havas la manuskripton de mia lingvo?... Jes, tiu cento da folioj ene de la ŝranko...Forbruligu ilin, mi petas! ...Jes, jes! Forbruligu ĉion!*

Turismi en ...

Zahara "de la Sierra" (Kadizo)

La reala nomo de la vilaĝo estas nur "Zahara" (prononcu: *Saára*), tamen, ofte oni aldonas la esprimon "de la Sierra" (Montara) por diferencii Zahara-n de alia urbo kun tre simila nomo: "Zahara de los Atunes", kiu ankaŭ troviĝas en la provinco Kadizo, kvankam marborde.

Ĝenerale estas akceptata, ke la nomo Zahara devenas de la araba "floro" -zahra-. Temas pri nomo aperanta en aliaj andaluziaj lokoj kaj en la araba kulturo. Tiel nomiĝis la kvina filino de la profeto Muhamado

kaj la favoratino de la kordova kalifo Abderahamano la 3-a.

Oni ne konas la tutcertan originon de la vilaĝo. Iuj asertas, ke temas pri la romia urbo *Regia*, pri kiu rakontas la romia verkisto Plinio. Kelkaj restaĵoj de romiaj tombejoj troviĝis en la urbo.

La unua dokumento mencianta *Zahara* datiĝas en la jaro 1282 kiam la kastilia reĝo Alfonso la 10-a "la Saĝulo" petis la kunlaboron de la sultano Ben Jusef, por lukti kune kontraŭ la filo de la kastilia reĝo, Sanĉo la 4-a, kiu ribeligis kontraŭ sia patro. La sultano akceptis la renkontiĝon kiu okazis en Zahara, tiama grava fortreso troviĝanta apud la landlimo.

En la jaro 1407 la kastilia reĝo konkeris la vilaĝo. Post kelkaj jardekoj, en 1481, la nazara granada reĝo rekonkeris ĝin. Ĉi tiu granada venko provokis kastilian respondon kun luktado inter ambaŭ armeoj ĝis la jaro 1492 kaj la definitiva konkero de la granada araba regnolando fare de la katolikaj gereĝoj. Do, oni povas diri, ke la falo de la granada islama regno

*Blazono de
Zahara*



komenciĝis en Zahara.

Post la kastilia konkero la kastelo okupis la ĉefan lokon en la vivo de la vilaĝo. La katolikaj gereĝoj donacis la urbon al *Rodrigo Ponce de Leon*, kiu fariĝis markizo de Zahara. La vilaĝo iĝis grava agrokultura kaj bruto-bredada centro.

Dum la napoleona invado de Hispanio, komence de la 19^a jarcento, la kastelo estis okupita de la franca armeo kaj tie okazis multnombraj ferocaj kombatoj post la sturmo de la kastelo fare de hispanaj gerilistoj.

Nuntempe Zahara troviĝas en la regiono de la blankaj vilaĝoj. En la vilaĝo loĝas 1400 homoj kies ĉefaj viv-rimedoj estas la terkulturado kaj la turismo. Lastatempe Zahara fariĝis unu el la plej gravaj lokoj por ĝui naturajn aventurojn, bazitaj sur sportoj kiel pad-marŝado, grimrado, speleologio, rajdado, ktp



Monumentoj

La kastelo de Zahara estis starigita de la granada araga reĝo. En la jaro 1282 tie okazis grava renkontiĝo inter la kastilia reĝo kaj araba sultano. En la jaro 1407 la kastelo kaj la urbo estis konkerita de la kastilianoj, kvankam la araboj okupis ĝin denove en 1841.

La kastelo estis grava fortreso ankaŭ dum la napoleona invado de Hispanio komence de la 19-a jarcento. Nuntempe nur staras kelkaj partoj de la murego kaj la ĉefturo. Estas eble viziti ĝin kaj estas eble vidi imponan pejzaĝon.



La turo de la horloĝo, konstruita dum la 16-a jarcento. Temas pri sonoril-turo starigita apud la preĝejo *San Juan de Letrán*. Komence de la 20-a jarcento oni instalis tie horloĝon kaj la turo ricevis tiun nomon.



La preĝejo de *Nuestra Señora de la Mesa* estas la ĉefa konstruaĵo en Zahara. Starigita meze de la 18-a jarcento laŭ baroka stilo, kiam finiĝis la konstruado ekaperis la nov-klasika stilo, kiu ankaŭ estas videbla en la preĝejo. Temas pri unu el la plej gravaj religiaj konstruaĵoj starigitaj en Andaluzio dum tiu jarcento.

La plano de la preĝejo estas latina kruco kun tri navoj. La ĉefa vidindaĵo en la preĝejo estas la centra altaro, konstruita laŭ rokoka stilo. Ene de la preĝejo ankaŭ troviĝas belega ĥorejo kaj impona orgeno.

Festoj

La ĉefa festo okazas fine de la monato oktobro, temas pri la festotago de Sankta Simono kaj Sankta Judaso Tadeo. Dum tiu tago estas memorata la konkero de la vilaĝo fare de la kristanaj trupoj en la jaro 1483. Amasa popola manĝado estas

organizata en centra placo de Zahara.

En la komenco de la somera sezono, fine de junio, okazas pilgrimado al la preĝejo de Sankta Johano. La tuta enloĝantaro iras en la bordon de la lago kaj tie okazas komuna festo.



En Zahara okazas festo honore al Kristokorpo ekde la jaro 1483, sendube temas pri la plej granda festo en la vilaĝo. Religia procesio marŝas tra stratoj plenaj je floroj. Zahara-anoj ornamas ilin per malgrandaj altaroj.

Gastronomio

La naturo havigas bonajn ingrediencojn al la Zahara gastronomio. Estas eble ĝui asparagstufajon, foli-betojn kun kikerroj,

sopa hervía kaj *sopa tostá*, kie tomatoj kaj kapsikoj ĉefrolas. Ankaŭ estas eble trovi bongustajn kaj altkvalitajn porkaĵojn.



"Plago" meze de la montaro en Zaharo.





Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Antonio Burguillos Vilches, juna fervojisto

Antonio Burguillos Vilches naskiĝis en la jaro 1913 en Puente Genil (Kordovo). Infan-aĝe, lia familio translokiĝis en Kadizon, tie la patro laboris kiel fervojisto. Post Kadizo la familio iris en la vilaĝon Sanlúcar de Barrameda (Kadizo), tie la patrino estis relkomutisto. En tiu vilaĝo li iris unuafoje en la lernejon.

En la jaro 1930 la familio denove iris en Kadizon. Jam 16-jaraĝa li eniris en fervojistan lernejon kaj nur unu jaron poste, li estis bagaĝ-oficisto, kvankam li devis atendi ĝis sia 18-a jaraĝo por okupi reale tiun postenon.

Jam laboristo en la hispana fervojista servo li daŭrigis siajn studojn kiel memlernanto. Inter tiuj studoj li lernis la internacian lingvon esperanton.

Samtempe li okupiĝis pri politikaj aferoj, li aliĝis al Komunisma Partio kaj fariĝis grava respondeculo en Kadizo de la Internacia Ruĝa Helpe, komunista helporganizo por financa kaj jura apogo de movadanoj, oni apogis per nutraĵo kaj mono la



Antonio Burguillos Vilches
1913 - 1936

familianojn de la arestitaj kaj enprizonigitaj komunistoj.

Kiam komenciĝis la hispana civila milito en julio 1936, li estis en Kadizo. La Komunisma Partio proponis al li foriri el la urbo, tamen li rifuzis tiun ideon. Li kaŝis sin en stacidomo, helpita de fervojisto kiu havis bonajn kontaktojn kun la ribelantoj, tio povus helpi al li. Li apenaŭ eliris el tiu loko,

kvankam del tempo al tempo li iris en sian hejmon. Okaze de unu el tiuj eliroj li estis arestita kaj poste enprizonigita en la malliberejo de El Puerto de Santa María. Urĝega proceso kondamnis lin al morto.

Li tuj estis enkarcerigita en la kastelo de San Sebastián, en Kadizo. Li, 23-jaraĝa, mortis pafite la 17-an de oktobro 1936.



Kelkajn horojn antaŭ ol morti li havis la eblon skribi du leterojn al sia familio. Ĉi tiujn korespondaĵojn gardas familiano, en la hispana lingvo tekstas jene:

Karaj gepatroj

En la kastelo de San Sebastián, hodiaŭ la 16-an vendrede, mi estas mortpafota; mi ne konas pro kio. Vi scias, mi mi ĉiam estis bona.

Havu paciencon, la tempo cikatrigos ĉi tiun vundon en via koro.

Mi ne timas la morton.

Diru adiaŭ al miaj fervojistaj kunuloj, multajn memorojn al Valenzuela.

Kison kaj brakumon por Pepe, Pilar, Rafael kaj Loli kaj al la najbaruloj.

Kun rezignacio

Toni

Alia letero de la 16-a de oktobro 1936 diras:

Karaj gepatroj: ne malĝojigu vin pro mia morto, ĉi tio ne gravas.

Mia lasta memoro estas por vi.

Antonio

Kisojn kaj brakumojn. En la kastelo San Sebastián mi vidas la lumon lastfoje.

Mi pardonpetas ĉar mi suferigis vin.

Toni.

Oni konas detale liajn lastajn momentojn, ĉar policisto, kiu estis amiko de la familianoj, ĉeestis la ekzekuton.

Kiam pastro oferis al li konfesi, li tion rifuzis, tamen li kisis la krucifikson ĉar, laŭ propraj vortoj *"ankaŭ li estis martiro"*. Li rifuzis la bendojn sur siaj okuloj kaj lastmomente li ekkriis:

Sbiroj! Alcelu lerte en la koron kaj ne suferigu min. Vivu la Respubliko!

Post la mortfpafo, oni havigis la kadavron al la familio, tamen ili ne havis monon por entombigi lin kaj maljuna amikino de la familio oferis sin por pagi la tombejon. Dum multaj jaroj lia korpo ripozis en la tombejo de San José kaj poste en tiu de Chiclana.

Kiam la gepatroj mortis la familianoj decidis kremacii la restaĵojn kaj forĵeti la cindrojn en la maron.



Maraj ondoj estu leĝeraj al vi,
juna samideano !



Antikva stacidomo de Sanlúcar de Barrameda (Kadizo)



$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

Komunikado inter formikoj

Formikoj estas sociema specio de la insekta familio. Ili rilatas kun vespoj kaj abeloj. Onidire, formikoj evoluis el vespecaj prauloj en la mezo de la Kretaco, antaŭ inter 110 kaj 130 milionoj da jaroj. Oni kalkulas, ke ekzistas ĉirkaŭ 22.000 specioj da formikoj.



Formikoj kreas koloniojn en kiuj povas loĝi kelkaj dekoj aŭ eĉ milionoj da individuoj, kiuj sukcesas organizi sin socie kaj eĉ modifi habitatojn, trovi rimedojn por supervivi kaj defendiĝi. Por atingi ĉi ĉion, la komunikado estas gravega.

Formikoj posedas tre kompleksan sistemon por komuniĝi. Ĉi tiu komunikado povas realiĝi dank'al la flar-senso, la vid-senso kaj la tuŝo-senso.

FLAR-SENSO. Sendube temas pri la plej perfektigita senso de ĉi tiuj insektoj. Por formikoj la odoro estas fundamenta afero, ĉar dank'al ĝi, formikoj povas esti agnoskataj kiel membro de komunumo aŭ ne.

La odoro estas produktata de feromonoj, temas pri kemiaj substancoj ege emisiitaj por transmeti informojn al anoj de la sama specio kaj modifi iliajn kondutojn. Ĉi tiu kemia komunikado estas ebla dank'al iliaj antenoj, tie troviĝas la ĉefaj riceviloj de formikoj rilate komunikadon.

Ankaŭ estas eble percepti tiun odoron produktitan de feromonoj sur substancoj lasitaj sur la tero. Ekzemple tiu odoro ebligas sekvi alian individuon de la sama komunumo, pro tio estas eble vidi formikon sekvantan la vojon tra kie iris alia individuo.



Alia maniero ebligi komunikadon estas la FIZIKA KONTAKTO, temas pri la tiel nomata: Antenumado, tio estas kontakto de du formikoj pere de iliaj antenoj.

Se vi rigardas atente formikejon, vi povos vidi, ke kiam formiko eliras el tiu loko, ĝi tuŝas la antenojn de alia

Tria sistemo pere de kiu formikoj efektivigas komunikadon inter si estas la SONO, VIBRADO kaj MOVOJ. Formikoj eligas sonojn eĉ kiam ili estas nur larvoj. Same, ili povas provoki vibradojn sur la tero, kiuj povas esti perceptitaj eĉ de foraj individuoj.


Laste, se vi rigardas formikaron, vi



individuo dum instanto. Pere de ĉi tiu kontakto, ili sciigas informojn unu la alian. Ankaŭ ekzistas fizika komunikado kiam formiko interŝanĝas nutraĵon kun alia. Tiel, formiko havigas al alia per sia maksilo ne nur nutraĵon sed ankaŭ substancojn, ĉefe fluidojn, ŝarĝitaj per kemiaĵoj entenantaj informojn.

povos vidi, ke ili movas sian kapon de unu flanko en la alian, sendube temas pri alia maniero ebligi komunikadon inter si.

Tio estas, formikoj montras al ni, ke la grandeco aŭ malgrandeco tute ne gravas kiam oni parolas pri kapablecoj de besto. Ĉi tiuj insektoj estas kapablaj organizi sin mem ene de socio, ili povas liberigi sian komunumon de danĝero, ekzemple pluv-inundo. Ili ankaŭ povas defendi sin mem kaj oferi sian korpon por eviti la eniron de malamikoj en ilian formikujon kaj por atingi ĉi ĉion neceso starigi komunikadon estas nepra.





Flamenko

La "rondeñas"

La rondeña, (prononcu: *rondenja*), estas branĉo de la flamenka kantado. Ekzistas du teorioj pri la deveno de la nomo. La unua asertas, ke ĝi devenas de la urbo *Ronda* (Arundo); la alia, ke la origino troviĝas en la kantaĵoj de la serenadaj rondiroj, *rondas* en la hispana lingvo. Plejeble la unua teorio estas prava, pro la fakto, ke ĉi tiu kanto, poste ankaŭ danco, aperis en regiono inter la provincoj Kadizo kaj Malago, proksime al la urbo *Ronda*.

Verŝajne temas pri antikva fandango, kvankam aliaj eseistoj pri la flamenka arto asertas, ke ĝi devenas de la kamparaj kantoj de la malaga provinco, simile al la *verdial*. Tutcerte, la *rondeña* naskiĝis en la kamparo, sed kiam gitaristo akompanis la kantisto, la *rondeña* eniris en la flamenkan arton.

La rondeña disvastiĝis dum la 19-a jarcento. Kelkaj eksterlandaj vojaĝantoj mencias ilin en siaj tekstoj. La strukturo de ĉi tiu kantaĵo estas jena:

- kvin aŭ ses versoj, ofte la dua estas ripetita. Origine la versoj estis ok-silabaj.



Antonio Pozo *El Mochuelo*
1868 ~ 1937

- La ritmo de la komenco ĝenerale estas tre lanta. Rilate la temojn, kutime ili pritraktas kamparajn aferojn.

La plej elstaraj flamenkaj kantistoj kiuj ludis *rondeñas* estis Fosforito, Jacinto Almadén, Rafael Romero, Enrique Morente kaj José Menese.

Sekve kelkaj tekstoj de *rondeñas* tradukitaj en la internacian lingvon:

Antonio Pozo "El Mochuelo" ludis jenan *rondeña* komence de la 20-a jarcento:

*El arbo forte staranta
kiam la branĉo faliĝas,
el arbo forte staranta,
La vento ĝin for ruligas
kaj fine vanuas l' branĉo*

Jen *rondeña* de *El Cojo de Málaga*, kiun poste ankaŭ ludis aliaj famaj kantistoj, kiel Juanito Valderrama kaj eĉ nuntempe Miguel Poveda:

*Kiel salo por kuirajo
mi bezonas vian amon,
kiel salo por kuirajo,
kiel vesto por la korpo,
kiel akvo por l'arbo,
kiel por povrulo almozo.*



FLAMENKA VORTARO

- **Palos** (Kanto-stiloj): temas pri la tradiciaj tipoj de la flamenka kantado. Ĉiu *palo* havas proprajn muzikajn karakterizaĵojn. Ili povas esti klasifikitaj laŭ la takto, la ritmo aŭ la geografia deveno.
- **Compás** (Takto): temas pri la metrika strukturo de la kanto-stiloj.
- **Duende** (Flamenka Sorĉo): abstrakta ideo kiu referencas la arton aperantan tute nature dum flamenka spektaklo. Ankaŭ temas pri la talento de la flamenkaj artistoj.
- **Tablao** (Flamenka Spektaklejo): temas pri la loko kie okazas flamenkaj spektakloj. Ili devenas el la "flamenkaj kafejoj" de la 19-a jarcento. Ili estas konsiderataj kiel la tempoj de la flamenka arto.



Fervojista Angulo

La fervojo de Oliv-oleo

Tiuj kiuj ŝatas biciklumi aŭ promenadi en la provincoj Kordovo kaj Jaeno povas ĝui la tiel nomataj "Verdajn Vojojn", temas pri eksa fervoja linio kiuj nuntempe estas uzataj kiel longaj vojoj por promenadi aŭ biciklumi.

La fervoja linio Linares-Puente Genil estis siatempe konata kiel la "fervojo de la oliv-oleo". Ĝi trakuris du provincojn kiuj produktas ĉefe oliv-oleon: Kordovo kaj Jaeno. La linio longis 175 kilometrojn kaj ĝi estis konstruita inter la jaroj 1879 kaj

1893 de la Andaluzia Fervoja Kompanio (CAF). Ĝis la jaro 1941 ekzistis en Hispanio privataj fervojaj kompanioj. En Andaluzio la plej gravaj estis MZA kaj CAF, ĉi lasta, kun sidejo en Malago, konstruis fervojajn liniojn inter Malago-Kordovo kaj Sevilo-Kadizo.

Pro la fakto, ke la linio Kordovo-Sevilo estis konstruita de alia kompanio (MZA), CAF decidis konstrui linion inter Linares kaj Puente Genil. La jaena vilaĝo Linares estis grava minada kaj industria centro,



Viadukto super la rivero Viboras en Jaeno

krome ĝi estis tre proksima al Espeluy, fervoja kunigo inter Andaluzio kaj Kastilio. La fino de la konstruita linio troviĝis en Puente Genil, tiu urbo, en la kordova provinco havis bonajn fervojajn komunikojn kun Malago.



Stacidomo en Martos (Jaeno)

CAF ekkonstruis la linion en la jaro 1879. Jam en 1881 estis eble vojaĝi de Linares en Jaenon. La konstruado finiĝis en la jaro 1893, en januaro de tiu jaro lokomotivoj kaj vagonaroj komencis trairi sur reloj. La andaluzia fervoja kompanio akiris 8 novajn lokomotivojn por ĉi tiu linio, oni uzis ankaŭ 10 pliajn de la linio Kordovo-Belmez.

Oni transportis varojn, ĉefe olivoleon, mineralojn de Linares, farunon kaj vinon. En la jaro 1936 CAF, la andaluzia fervoja kompanio, eniris en ne-solveblan ekonomian krizon, la ŝtato devis kontroli ĝin. En 1941 la kreo de la tutnacia fervoja kompanio RENFE enirigis ĉi tiun fervojan linion en la novan kompanion.

En tiuj jaroj oni konstruis, apude al kelkaj stacidomoj, grandajn olivujojn. La celo estis garantii la prezon de la oliv-oleo pere la staplado de tiu produkto.

Tamen, komence de la 7-a jardeko, la linio prezentis deficitan buĝeton al la fervoja kompanio. Evidente la aŭtomobilojn kaj la transporto de varoj per aŭtovojoj konkurencis kun la fervojoj. Iom post iom, kelkaj stacidomoj fermiĝis. Krome, en oktobro 1984 okazis akcidento kiu damaĝis relojn kaj la fervoja servo ĉesis.

Nur funkciis la linio inter Espeluy kaj Jaeno, sed definitive, en la jaro 1985 la linio fermiĝis.

Feliĉe, post la malapero de la fervoja linio, kelkaj vilaĝoj decidis konstrui sur la lokoj kie antaŭe trairis reloj, vojojn por bicikloj kaj promenantoj. Naskiĝis tiam la "Verda Vojo de la Oliv-Oleo", kiu trakuras 128 kilometrojn el tiuj 175 kie antaŭe trakuris vagonaroj.

Nuntempe trajnoj kaj stacidomoj apartenas al la historio de multaj vilaĝoj en Kordovo kaj Jaeno.

fervojista@esperanto.ac



Andaluza Kuirarto

"Sopa tostá" kun tomato

Kvankam la nomo "sopa" en la hispana memorigas al ni la tradukaĵon en esperanto "supo", tio estas: likva manĝaĵo, konsistanta en akvo, en kiu estis kuiritaj diversaj ingrediencoj, la "sopa tostá" aŭ "zopa tostá", tute ne rilatas al kutimaj "supoj". Ĝi reale similas al alia fama manĝaĵo en Andaluzio, tre ofta en la kamparo: la frititaj paneroj. Do, ni preparu "sopa tostá" kun tomato, tradicia manĝaĵo en la Kadiza montaro.



Bonan Apetiton !

Ingrediencoj:

- Ajleroj tranĉitaj (kelkaj).
- Verda kapsiko tranĉita.
- Tomatoj.
- Malmola pano.
- Salo.
- Akvo.
- Oliv-oleo

Kaj jen la preparado:

- 1) Fritetu la ajlerojn en la oliv-oleo. Poste aldonu la verdan kapsikon. Fritetu ĉion.
- 2) Kiam la ajleroj jam estos or-koloraj aldonu la tomatojn tranĉitajn. Ili devas verŝi sian sukcon malrapide.
- 3) Aldonu panon kaj salon. Movu ĉion kaj verŝu akvon iom post iom.
- 3) La tutaĵo devas esti or-kolora. Poste turnu ĝin en la pato, apogita sur telero. Atentu, temas pri malfacila manovro, ĉar ĉio povas faliĝi. Daŭrigu la malrapidan varmigon, ĝis kiam la pano atingos belaspektan rostitan koloron.
- 4) Oni povas aldoni pliajn ingrediencojn, ĉefe porkaĵojn, se tiel enmetu ilin en la paton antaŭ ol aldoni la panon.



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La malsanulejo de la mortintoj

En la jaro 1946 Unuiĝintaj Nacioj kondamnis la politikan reĝimon de la ĝeneralo Franko en Hispanio, ĉar li aliancis kun nazioj kaj faŝistoj dum la dua mondmilito. Tiam, malmultaj ŝtatoj subtenis diplomatiajn rilatojn kun Hispanio.

Dum tiuj jaroj komenciĝis en Eŭropo la, tiel nomata, "malvarma milito" inter Usono kaj Sovet-Unuiĝo. La usona registaro konstatis, ke la ĝeneralo Franko povus esti bona aliancano, ĉar li rifuzis la komunisman sistemon. Tiel, malgraŭ la rezolucio de UN, Usono kaj Hispanio subskribis akordon en la jaro 1953, kiu finigis la politikan izoliĝon de la frankisma reĝimo.

Pere de tiu akordo Usono rajtis establi militajn bazojn en Hispanio. En Andaluzio la usona armeo starigis bazojn en Rota (Kadizo), en Morón (Sevilo) kaj en la urbo Sevilo mem. Tiel, en la jaro 1953 usonanoj instalas sin en la sevila flughaveno kaj sur apudaĵoj. Tie ili konstruis propran kvartalon kun vendejoj, restoracioj, teatro, lernejo kaj malgranda hospitalo.

Milit-bazoj en Rota kaj en Morón daŭriĝis, sed usonanoj foriris el Sevilo en la jaro 1972. Tiam, la usona armeo cedis la hospitalon al la urbo por utili kiel universitata hospitalo.

Tiama usona milit-hospitalo en Sevilo kiam la konstruaĵo utilis kiel lernejo fine de la 70-aj jaroj



Ĉi tiu hospitalo funkciis ĝis la fina konstruo de la Sevila Hospitalo en la jaro 1974. La tiama usona hospitalo etendiĝis tra helkaj konstruaĵoj kun nombraj ĉambroj. Ĝi troviĝas tuj apud la sevila flughaveno kaj laŭdire ĝi estas nuntempe scenejo de strangaj okazintaĵoj. Onidiraĵoj asertas, ke tie ekzistas sekretaj ĉambroj, eĉ oni asertas, ke dumnokte, ene de unu el tiuj strangaj ĉambroj, estis eble vidi malgrandan lumon tra la fendoj de la pordo, kiu ne estis eble malfermi.

La loko ankaŭ utilas kiel observejo por aviadil-ŝatantoj. Unu el ili asertis, ke dum li vidis la flugilojn surteriĝi, li aŭskultis voĉon de knabino. Li ĝiris sian kapon, sed neniun li vidis. Tio mem okazis kelfoje, ĝis la momento kiam li sukcesis vidi dekjaraĝan knabinon en malbonaj vestaĵoj. La knabino tiam diris ... *mi vokis vin, ĉu vi ne aŭskultis min?* Kiam li provis respondi, la knabino vanuis.



Nuntempa ruina stato de la tiama usona milit-hospitalo en Sevilo

Esploristoj pri parapsikologio multe raportis pri tiu loko. Laŭdire, oni registris sonojn, pere de kiuj estas eble aŭskulti help-petantajn kriojn... *jen mi, jen mi, mi ne mortis!* Ŝajne, temas pri knabino kiu, iuj asertas, faliĝis ene de puto kaj tie ŝi terure mortis.

Kiel dirite, la usona hospitalo fermiĝis komene de la 7-a jardeko. Hodiaŭ, tie nur estas eble vidi ruinaĵojn, kvankam ĉiuj vizitantoj asertas, ke estas eble senti energion en tiu loko kiu antaŭe estis hospitalo. Tiu loko nuntempe estas konata kiel "La malsanulejo de la Mortintoj".

Vorto-Ludoj



Krucvorto

	1	2	3	4	5	6	7
A							
B				■			
C							
Ĉ							
D		■				■	
E				■			
F							


HORIZONTALE

- A. Testikoj.
- B. Korinklino al iu. ■ (*Inverse*) grupo de samspecaj objektoj.
- C. (*Akuzative*) Eta anatomia aŭ patologia formaĵo.
- Ĉ. Maldika koloneto el grafito entenata en ligna bastoneto uzata por skribi.
- D. Konsonanto. ■ (*Sen la lasta vokalo*) Nomo de bela floro. ■ Vokalo.
- E. (*Inverse*) Instrumento. ■ (*Inverse*) Maceri tekseblan planton en likvo.
- F. Lakto kazeigita kaj acidigita per speciala fermento.

VERTIKALE

1. (*Plurale*) Unu el la signoj de la zodiako.
2. (*Inverse*) Iam ĉiuj vojoj kondukis tien. ■ Konjunktio esprimanta diferencon.
3. (*Plurale kaj inverse*) Ago de iu aŭ io kiu rondire turniĝas.
4. Nulo. ■ Loko ■ Verba finaĵo.
5. (*Inverse kaj akuzative*) Rizaĵo, substota en butero, ligita per varmega buljono kaj aliaj ingrediencoj
6. (*Akuzative*) Alt-valora metalo. ■ Eksperimenta, do ne-oficiala, sufikso signifanta «kiun oni -us»
7. (*Inverse kaj plurale*) Ekvatora konstelacio.

Rebuso



Kie vi estis dum la ferio-tago? _____

*Se vi kapablis solvi ĉi tiujn vorto-ludojn, sendu vian solvon al jena ret-adreso:
cordoba@esperanto.ac*

SOLVOJ AL LA PASINTAJ KRUCVORTO KAJ REBUSO


E	N	S	P	E	Z	O
N	E	I		N	O	T
A	B	A	Z	I	O	N
M	U		★		L	A
I	L	I	A	D	O	N
Ĝ	O	L		E	G	E
O	N	I	S	K	O	T

REBUSO

La advokato specialiĝis pri..... *Separo inter geedzoj*

Sur la bildo aperas aro da nombroj 7 (sep) inter du geedzoj, do
SEPARO INTER GEEDZOJ.

HUMURO



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Vicepresidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org



Inglés
Francés
Aleman
Italiano
Portugués
Neerlandés

Árabe
Chino
Japonés
Ruso
Esperanto

Catalán/Valenciano
Gallego
Euskera

Español para
extranjeros
Lengua de Signos
Española

CUID
CENTRO
UNIVERSITARIO
DE IDIOMAS
DIGITAL
Y A DISTANCIA

UNED

Allí donde estés.

ONLINE Y PRESENCIAL

56 sedes en 49 provincias

MATRÍCULATE AHORA ONLINE

www.cuid.uned.es

